

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1900:

Skandinavaj kronoj 4,00 = germanaj markoj
4,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = portu-
galaj rejsoj 1000 = brazilaj rejsoj 2000 =
aŭstro-hungaraj kronoj 5,50 = dolaroj 1,25
= ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio. 10 %
rabato por duonjaraj. 25 % rab. por tut-
jaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ
pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Presejo de Paŭlo de Lengyel, Szegvár, Magyar-
ország* (Hungarujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la
Presejo.

N:o 12 (48)

la 31:an de decembro 1899

IV:a jaro.

Al ĉiuj amikoj de la gazeto L. I.

Tiu ĉi numero finas la IV:an jaron de nia gazeto kaj estas la lasta dum la 1800-a jararo.

Kiam ni esprimas nun vorton de danko al ĉiuj amikoj de la gazeto kiuj restis fidelaj — fideleco tiom pli grandvalora, ĉar la gazeto devis batali kontraŭ diversaj malfacilaĵoj —, ni povas kun ĝojo aldoni al nia "adiaŭ" ankaŭ la saluton "ĝis revido".

Niaj legantoj scias per N:o 9, ke ĉe la fino de l' jaro 1899 mankis eldonanto al la gazeto kaj ke la ĝisnuna redaktoro promesis preni sur sin solan la tutan ŝarĝon de l' gazeto, se 500 abonoj estus promesitaj antaŭ la fino de l' jaro. Ĝis kiam ni skribas tion ĉi, nur 216 abonoj estas promesitaj. Sub tiaj cirkonstancoj li ne havis la kuraĝon riski la entreprenon, ĉar eĉ ne estis tute certe, ĉu li loĝos la tutan jaron en Upsala, kio estus tamen necesa por prizorgi la legon de korekturoj kaj la ekspedadon.

Ĉar tamen la ĉeso de l' gazeto eble alportus danĝeron por la afero Esperanta, ni penadis laŭ niaj fortoj por trovi rimedon daŭrigi la eldonadon.

Tia rimedo jam estas trovita.

Tiun ĉi ĝojigan sciigon niaj amikoj dankas al s-ro Paŭlo de Lengyel, la talenta eldoninto de la "Libro de l' Humoraĵo". Li prenis sur sin por tre modera kosto presi kaj dissendi la gazeton el sia presejo.

Konklude, "Lingvo Internacia" eliros dum la jaro 1900 sub la rilatoj sekvantaj.

La gazeto estos eldonata en 12 numeroj 16-paĝaj kaj kostos 4 skand. kr. = 4,50 germ. mk. = 5,75 frk. = 2 rubl. = 4 1/2 ŝil. = 5,50 aŭstr.-hung. kr.

La formato de l' gazeto estos iom ŝanĝita tiel, ke la larĝo de l' paĝoj estos iom pli granda, kaj ĉiu paĝo estos dukolona.

Ĉar la kostoj por preso kaj poŝtpaĝoj estos malpli grandaj ol la ĝisnunaj kaj ĉar sendube la nombro de l' abonantoj ankoraŭ multe pli grandigos, ni povas esperi, ke la entrepreno ne kaŭzos malprofiton.

Se la nombro de l' abonoj dum la jaro estos malpli ol 400, la redaktoro ne prenos ian salajron.

Se la entrepreno donos profiton, la sumo, per kiu la enspezoj superas la elspezojn, estos ŝparata kiel fondkapitalo por sekurigi la estontecon de la gazeto mem, kaj ju pli granda tiu ĉi fondkapitalo estos, des pli malmultekosta, granda kaj ofta povos esti la gazeto dum la sekvontaj jaroj.

*

Ni petas, ke ĉiuj, kiuj promesis aboni, volu kiel eble plej baldaŭ sendi la tutjaran abonmonon al s-ro Paŭlo de Lengyel, könynyomdája, en Szegzárd, Hungarujo. Li kvitancos ĉiun ricevitan sumon en la proksima numero.

La rusoj povas sendi la pagon (2 rubl.) al la sekretario de l' Societo "Espero", s-ro V. Rogačev-Antonov, Kazanskaja 26, loĝ. 52. St. Peterburgo.


*

Ĉiujn manuskriptojn presotajn en la gazeto oni sendu al la redaktoro, s-ro Paŭlo Nylén; abonmonon por 1900 (ne por antaŭa jaro), pagon por anoncoj kaj tekston de anoncoj oni sendu al s-ro P. Lengyel.

*

*Ne forgesu varbi novajn abonantojn!
Antaŭ ĉio — ne forgesu aboni mem!!*

La redakcio.



Novajoj.

Libro de l' humoraĵo. Kolekto da spritaĵoj. Kun la helpo de L. de Beaufront redaktis kaj eldonis Paŭlo de Lengyel. La antaŭparolon skribis Paŭlo Nylén. Szegzárd (Hungarujo). El la presejo de l' eldoninto. Prezo 3 frankoj.

Tiu ĉi verko, pri kiu ni anoncis kelkfoje en L. I., estas nun presita kaj aĉetebla ĉe s-ro R. Lemaire. Ĝi estas bone kaj bele farita, kaj ni rekomendas ĝin varme al ĉiuj amikoj de nia literaturo, kiel gajiga legaĵo kaj ankaŭ uzebla ekzercilo por la komencantoj. Ni reparolos pri ĝi.

* * *

La svedaj propagandaj kovertoj estas riceveblaj ĉe la Klubo Esp. Upsala kaj kostas 1 kr. po 100. Ĉiuj skandinavaj esperantistoj devas uzadi tiun ĉi tre oportunan rimedon por dissemi anoncojn pri Esperanto. Eĉ la plej malgranda montro pri nia afero estas signifa, ĉar "eĉ guto malgranda, konstante fraparte, traboras la monton granitan!"

* * *

En la rusa medicina gazeto "Vrač" N:o 43, en la rubriko "Kronikaĵo" sub N:o 1638 estis presita tiu ĉi sciigo:

"En *kunventuro de l' prezentantuloj de sciencaj akademioj*, efektiviĝinta en Wiesbaden'o laŭ invito de la Prusa Akademio, kiel rakontas "The British Medical Journal" (14 de oktobro), — estis prijuĝata, interalie, ankaŭ la demando *pri difino de l' internaciaj lingvoj — la latina* por sciencaj komuniĝoj kaj *la angla* por privataj. Dubante je la plenumiĝo de tiu ĉi problemo, "The Brit. Med. Journ." notas tamen la gravan signifon de tiu cirkonstanco, ke "la gloraj kaj eminentaj prezentantuloj de l' scienco kunveturis el ĉiuj eŭropaj regnoj kaj el Ameriko kun la celo elserĉi ilojn por pli plena reciproka komprenado, farinte tiamaniere, tiel diri, konsiliĝadon de paco en scienco".

Al tiu ĉi sciigo, la redaktoro de l' "Vrač" faris sekvantan rimarkon: "La penso pri la lingvo latina por sciencaj komuniĝoj de l' estanto kaj estonto al ni ŝajnas direkte monstra. Ĉu povas taŭgi malviva lingvo por viva, senĉese kaj tre rapide disvolviĝanta afero?"

Al tiu rimarko oni devus aldiri, ke ĉiu lingvo por fariĝi *internacia lingvo* devas antaŭ ĉio *esti facilege kaj rapide ellernata*; nenia el la ekzistantaj (naciaj) lingvoj, kiel vivaj tiel ankaŭ malvivaj, ne povas kontentigi tiun ĉi *necesan* kondiĉon, kaj la plej malmulte *la angla* lingvo kun ĝia terurega elparolado kaj ortografio.

A. Vejtcler.

* * *

Priamurskija Vjedomosti, gazeto eldonata en Ĥabarovsk sur Amur (Sibirujo), en N:o 309 (21/XI) kun videbla plezuro sciigas, ke en N:o 6 de "*Supplement de l'Espérantiste*" estas presita la traduko en Esperanto de la verko de l' *ĉi tiea* aŭtoro, d-ro Kirilov: "La konstruo de l' mondo laŭ la sanktaj libroj de l' lamanoj", prenita al la memuaroj de l' *ĉi tiea* instruita Geografia Societo.

* * *


Pri Esperanto parolis. La Stokholma gazeto *Hjulsport* (radsporto) skribas en sia N:o 50, la 14-an de dec.:

"El malgranda gaje kaj agrable verkita flugfolio, kiun la Klubo Esperantista Upsala antaŭ nelonge elsendis, ni represas por la intereso de la kosmopolitanoj inter niaj legantoj tion ĉi sekvantan, kio estas amuza kaj klariga. Turisto kun internaciaj planoj kaj interesoj ne devas esti tute nescianta pri lingva fenomeno tiel karaktera por nia tempo kiel Esperanto. Por la ceteraj legantoj tiu ĉi lingvo povas havi almenaŭ la intereson de kuriozeco."

Post tiuj ĉi vortoj la redakcio de *Hjulsport* represis la plej grandan parton de la dirita propaganda folieto. Sub la rubriko "literaturo" la nova eldono de la vortaro sveda-esperanta kaj "Lingvo Internacia" estas anoncataj.

— En la kristnaska numero de sveda gazeto "*Brand*" ties redakcio bonvole enmetis senpagan anoncon pri la sveda lernolibro de Esperanto. Pro tio ĉi ni kore dankas!

— "*Fredsfanan*", organo de l' sveda societo por la paco, presis en sia decembra n:o 17 grandan leteron al la redakcio skribitan de s-ro Ahlberg en tre konvinka kaj interesiga maniero pri la ideo de internacia lingvo kaj la solvo de tiu ĉi ideo per Esperanto.



Heroo.

Antaŭ kelkaj jaroj okazis. La juna svedo, studento Munthe, estis preta je sia ekzameno en la urbo Upsala, kaj per la vaporŝipo "Umeå" li vojaĝas hejmen plena da ĝojo, espere pensante pri sia estonteco. Sur la Bottenmaro la ŝipo pereis kaj la vojaĝantoj kuras en la savboatojn. La lasta el tiuj ĉi jam estas preta malproksimiĝi; tiam oni ekvidas sur la subakviganta ŝipo ankoraŭ restantan virinon vilaĝanan kun sia infano sur la brakoj. Ŝi venas kurante preta por salti en la boaton, sed en tiu ne estas pli da loko. La virino agonianta kun larmoj petas kaj petegas por savo, sed la respondo estas: neeble, neeble! Je ĉiu momento la ŝipo pli profunde subiĝadas, kaj la boato ne povas resti tie pli longe. La virino daŭrigas petegi. Tiam la juna studento saltas ree al la vaporŝipo, helpas la virinon kun sia infano paŝi en la boaton en lia loko, kaj oni forremas rapide.

La herokuraĝa studento donis — de sia varma koro kaj bona volo — sian lokon al ia nekonata virino, dum li mem en la nokto staras ree sur la alfundiĝanta ŝipo sciante, ke li post kelkaj momentoj estos entombigita en la profundaĵo de la maro. Liaj gepatroj vane atendas sian amatan filon. Li mortis heroe. Gloro ripozu sur lia memoro, kiu ne tro rapide estu forgesita!

Tradukis **Haldor Midthus.**



Rozoj de la morto.

El la dramo "Karin Månsdotter" de *Adolf Paul.*

La vivo similas al rivero ondiga, kiu antaŭen serpentigas inter dometoj kaj palacoj. Preter gloro kaj potenco, riĉeco kaj mizero senhalte, sentrankvile ĝi eterne fluadas renkonte al la nesciata. — Ĝi venas de la mateno kaj fluas okcidenten. Sur ĝia supraĵo naĝas boato vaganta, en kiu sidas infano — kaj tiu ĉi infano estas la morto mem. Sed neniu tion scias — homo mortema ne komprenas ke la morto estas vivo ekburĝonanta en nova printempo. Al lia imago la morto aperas kiel fantomo terura kun ostoj senviandaj.

Sed la morto nekonata antaŭen naĝas en sia boato kiel infano senzorge ludanta kaj kronon li kunligas el dornoj kaj rozoj — el rozoj ruĝaj kiel sango.

Li supren rigardas, ekvidas homojn sur la bordo kaj ridetas — etendas al ili siajn manojn kaj ridetas. Li salutas la infanon sur la brako de la patrino, la junulinon apud sia fianĉo, la viron laboreman, la grizulon kadukan — kaj subite malaperas la rozoj de l' vangoj, la vivo pasas, kaj al sia krono ligas novan floron la morto.

Ĉiam pli malproksimen li vagas renkonte al la nokto — ludas kun la floroj sur la bordo kreskantaj, prenas rikolton post rikolto el la rozoj de l' vangoj, kovras per paleco vizaĝojn rigidiĝantajn.

Dolĉa estas la floro kreskanta en la boskoj de l' vivo, pli dolĉa do ĝi estas rikoltite en sia florado. Neniam pasos la ĉarmo de tia rozo, neniam ĝia brilo paliĝos kaj rigardoj miremaj ĝin sekvos tra la tempo ĝis la gloro eterna.

El lingvo sveda tradukis

H. C—d.



La knabo ĉe Kristo je l' abio.

(Rakonto de F. M. Dostojevskij.)

— Tio ĉi okazis ĝuste je l' antaŭtago de Kristnasko en ia grandega urbo kaj tempe de terura frostoj.

Knabo, ankoraŭ tre malgranda, apenaŭ de ses aŭ eĉ de pli malmultaj jaroj, vekigis matene en malseketa kaj malvarma kela loĝejo. Li estis vestita en ia nokta surtuteto kaj tremadis. Lia spirado elflugadis en vido de blanka vapore, kaj li, sidante en angulo sur kesto, pro enuo intence eligadis tiun ĉi vaporon el la buŝo kaj amuzigadis, rigardante, kiel ĝi elfugas. Sed li tre deziradis manĝi. Li kelkfoje de la mateno aliradis al la dormbenko, kie sur maldika, kiel flano, substernaĵo kaj sur ia ligitubero, anstataŭ kuseno sub la kapo, kuŝadis lia malsana patrino.

Ŝi alveturis kun la knabo el fremda urbo kaj subite malsaniĝis. Oni forprenis en policejon la mastrinon de l' anguloj antaŭ du tagoj; la loĝantoj disiris en sekvo de la festo, kaj unu restinta vagisto jam tutajn dudek-kvar horojn kuŝadis morteme malsobra, ne atendinta la feston. En alia angulo de l' ĉambro ĝemadis de reŭmatismo ia okdekjara maljunulineto, iam kaj ie servinta infanistino, nun do mortanta solece, ĝemante, mallaŭdante kaj murmurante la knabon, tiel ke li jam timadis aliri proksime al ŝia angulo. Li atingis trinki ie en vestiblo, sed nenie trovis eĉ unu peceton da pano, kaj preskaŭ je deka fojo jam aliradis por veki sian patrinjon.

Fine ĉio al li stariĝis timeme en la mallumo: jam longtempe komenciĝis la vespero, sed oni ne ekbruligis fajron. Palpinte la vizaĝon de l' patrino, li miris, ke ŝi entute ne moviĝas kaj fariĝis tiel same malvarma, kiel la muro. "Jam tre malvarme estas tie ĉi", pensis li, restis iom starante, senkonscie forgesinta sian manon sur la ŝultro de l' mortintino, poste ekspiris sur siajn fingretojn por ilin varmigi, kaj subite palpinta sian ĉapeton sur la dormbenko, iris mallaŭtete, palpe el la kelo. Li ekirus ankoraŭ pli frue sed ĉie timadis la grandan hundon, supre, en la ŝtuparo, kiu blekadis la tutan tagon apud najbara pordo. Sed la hundo jam ne estis tie, kaj li subite eliris la straton.

Ho Dio, kia urbo! Neniam ankoraŭ li vidis ion similan. Tie, de kie li veturis, je l' noktoj estas tiela nigra mallumego, — sola lanterno por la tuta strato. La lignaj malaltaj dometoj estas fermitaj per fenestraj kovriloj; sur la strato, apenaŭ ĝi krepuskiĝis — neniue estas, ĉiuj sin fermas je l' domoj, kaj nur blekadas tutaj amasoj da hundoj, la centoj kaj miloj da ili blekas kaj bojas la tutan nokton. Sed tie estadis anstataŭe tiom varme kaj al li oni donadis manĝi, tie ĉi do — ho, Dio, se li manĝus! Kaj kiela tie ĉi estas frapo kaj tondro, kia lumo kaj homoj, ĉevaloj kaj kaleŝoj, kaj frostoj, frostoj! La frosta vapore buliĝas de lacigitaj ĉevaloj, el iliaj varmege-spirantaj buŝegoj; tra malfirma neĝo sonoras sur ŝtonoj la hufoj, kaj ĉiuj tiom puŝas unu la alian, kaj, ho Dio, li tiel volas manĝi eĉ se ian peceton, kaj tiel doloris subite liaj fingretoj! Pretere pasis policisto kaj sin deturnis por ne rimarki la knabon.

Jen denove strato, — ho kiom larga! Jen tie ĉi oni dispremos vere; kiel ili ĉiuj krias, kuras kaj veturas, kaj kiom da lumo, kiom da lumo. Kaj kio estas tio ĉi? Ha, kia granda vitro, post la vitro do estas ĉambro kaj en la ĉambro staras arbo ĝis la plafono: tio ĉi estas abio, kaj sur la abio, kiom da fajroj, kiom da oraj paperetoj kaj pomoj! Kaj ĉirkaŭe tie ĉi mem — pupetoj, malgrandaj ĉevaletoj, kaj en la ĉambro kuras infanoj ornamitaj, puraj,

ridas kaj ludas, manĝas kaj trinkas ion. Jen knabino komencis danci kun knabo, kia bela knabino! Jen ankaŭ muziko, aŭdate estas tra la vitro. — Rigardas la knabo, miras, kaj ridas jam, al li do jam doloras la piedaj fingretoj, kaj la manoj fariĝis tute ruĝaj, ili jam ne fleksiĝas kaj dolore estas ilin movi. Kaj subite rememoriĝis la knabo, ke liaj fingretoj tiel doloras, li ekploris, kaj kuris pli malproksimen; kaj ree li vidas tra alia vitro ĉambrom, ree tie estas arboj, sed sur tabloj kuŝas kukoj, ĉiaj — la migdalaj, la ruĝaj, la flavaj, kaj sidas tie kvar riĉaj sinjorinoj, kaj kiu venas, al tiu ili donas kukojn, kaj malfermiĝis la pordo ĉi minute, de la strato al ili eniras multaj sinjoroj. Mallaŭte aliris la knabo, subite malfermis la pordon kaj eniris. Ho, kiel oni ekkriis kaj svingis al li! Unu sinjorino pli rapide aliris, ŝovis en lian manon kopeketon kaj mem malfermis por li la pordon sur la straton. Kiel li ektimis! La kopeko do tie ĉi same ekruĝiĝis kaj sonoris sur la ŝtupetoj: li ne povis fleksi siajn ruĝajn fingretojn kaj teni ĝin. Elkuris la knabo kaj iris pli-pli rapide, sed kien — li mem ne scias. Li volas ree ekplori, sed jam timas, — kaj kuras, kuras kaj ekspiras sur la manetojn. Kaj atakas lin malgajeco, ĉar subite fariĝis al li tiel solece kaj timeme; kaj subite — ho Dio! Kio do tio ĉi estas denove? Staras homoj amase kaj miras: sur fenestro post la vitro estas tri pupoj, malgrandaj, vestitaj de ruĝaj kaj verdaj vestetoj kaj tute-tute kiel vivaj. La maljunuleto sidas kaj kvazaŭ ludas je granda violono, la du aliaj staras tie ĉi same kaj ludas je malgrandaj violonetoj, kaj takte balancas la kapetojn, kaj rigardas unu la alian, kaj ĝiaj lipoj moviĝas, parolas, vere parolas, — nur jen el post la vitro ne estas aŭdate. Kaj la knabo pensis antaŭe, ke ili estas vivaj, sed kiam entute li divenis, ke ili estas pupetoj — li subite ekridis. Neniam li vidadis tielajn pupetojn nek sciadis, ke estas la tielaj! Kaj plori li volas, kaj tielaj ridindaj-ridindaj estas la pupetoj. Subite li sentis, ke iu ekkaptis lin el poste je la surtuteto: unu granda malbona knabo staris apude kaj subite krakigis lin je l' kapo, deŝiris lian ĉapon, kaj mem de malsupre ekbatis lin per piedo. La knabo ekruĝiĝis sur la teron, tie ĉi oni ekkriis, li svenis, suprensaltis kaj ĵetiĝis kuri-kuri, kaj subite kuris, kien li mem ne scias — en sub la pordegon, sur fremdan korton, — kaj sidetiĝis post lignoj: “Tie ĉi oni ne elserĉos, kaj krom tio mallume estas.”

Sidetiĝis li kaj kunpremiĝis, sed mem ne povas ripozi pro timo — kaj subite, tute subite, al li fariĝis tiel bonege: la manetoj kaj la piedetoj subite ĉesis dolori kaj fariĝis tiel varme, tiel varme, kiel sur forno; jen li ektremis la tuta: ha, li ja apenaŭ ne ekdormis! Kiel bonege estas tie ĉi ekdormi: “Mi sidetiĝos tie ĉi iom kaj iros ree rigardi la pupetojn”, pensis la knabo kaj ekridetis rememoriĝinte ilin: “Tute kiel vivaj!”... Kaj subite li aŭskultis, ke super li ekkantis kanteton lia patrino. “Panjo, mi dormas, ha, kiel bonege estas dormi tie ĉi!”

— “Ni iru al mi je l' abio, knabo”, murmuretis subite super li la mallaŭta voĉo.

Li pensus, ke tio ĉi estas ĉio la patrino, sed ne, tio ĉi ne estas ŝi; kiu do lin vokis, li ne vidas, sed iu fleksiĝis super li kaj ampleksis lin en la mallumo; kaj li eltiris la manon kaj... kaj subite, — ho, kioma lumo. Ho, kioma abio! Sed tio ĉi ja ne estas abio, li ankoraŭ ne vidis tielajn arbojn. Kie do li estas nun: ĉio brilegas, ĉio lumas, kaj ĉirkaŭe ĉio estas pupetoj, — sed ne, tio ĉi estas knaboj kaj knabinoj, nur tiel lumaj; ili ĉiuj kuras ronde apud li, flugas, ĉiuj kisas lin, prenas lin, portas kun si, kaj li mem flugas kaj

vidas: lia patrino rigardas lin kaj ridas ĝoje. — “Panjo! Panjo! Ha, kiel bonege estas tie ĉi, panjo!” krias al ŝi la knabo, kaj ree kisas infanojn, kaj li volas rakonti pli rapide al ili pri tiaj pupetoj post la vitro. “Kiu vi estas, knaboj? Kiu vi, knabinoj?” demandas li, ridante kaj amante ilin. — Tio ĉi estas “la Krista abio”, respondas ili. “Ĉe Kristo ĉiam en tiu ĉi tago estas la abio por malgrandaj infanoj, kiuj ne havas tie propran abion... Kaj sciigis li, ke tiuj ĉi knaboj kaj knabinoj ĉiuj estas tiaj samaj infanoj, kiel li, sed unuj frostiĝis ankoraŭ en korboj, en kiaj oni subjetis ilin sur ŝtuparojn apud pordoj de peterburgaj oficistoj, aliaj sufokiĝis ĉe finlandinoj, al kiuj ili estis fordonitaj de l' Edukanta domo por nutri, triaj mortis apud sensukiĝintaj mamoj de siaj malsataj patrinoj, — kaj ĉiuj ili nun estas tie ĉi, ĉiuj nun simile al anĝeloj, ĉiuj ĉe Kristo, kaj Li mem estas en la mezo de ili, kaj etendas la manojn al ili, kaj benas ilin kaj iliajn pekajn patrinojn... Kaj la patrinoj de tiuj ĉi infanoj ĉiuj staras tie ĉi same, flanke, kaj ploras; ĉia rekonas sian knabon aŭ knabinon, kaj ili alflugas kaj kisas ilin, deviŝas iliajn larmojn per siaj manetoj kaj petegas ilin ne plori, ĉar tie ĉi al ili estas tiel bonege...

Kaj malsupre, je l' mateno, la kortistoj trovis la malgrandan korpeton de la knabo alkurinta kaj frostiĝinta post lignoj...

El rusa tradukis A. Vejtcler.



La morto.

(Malgrandrusa fabelo.)

Unu vilaĝano malriĉa havis multe da infanoj: “dudek kaj unu filojn”. Post longa pripensado la malriĉulo decidis iri al la reĝo kaj peti helpon por si kaj siaj filoj multnombraj, kiuj post iom fariĝus servantoj de la reĝo — soldatoj. La reĝo donis al li monon, panon, brasiksupon kaj kolbason por la vojo.

Reirante, laciĝinta de longa vojo, la vilaĝano eksidiĝis por ripozo kaj manĝo. Subite li vidas ke iras virino tre maljuna kaj malgrasa. Alproksimiĝinte al la vilaĝano, ŝi ekpetis panon: “donu, homo, panon al mi”.

— “Kiu vi estas, maljunulino?” ekdemandis la vilaĝano.

— “Mi estas la morto!”

La vilaĝano timiĝis kaj dedonis al ŝi ne sole la panon, sed eĉ la tutan kolbason. La morto tuj formanĝis la tutan kolbason kaj eĉ ne restigis la ŝnuron, per kiu oni ĉirkaŭligas la finojn de kolbaso. Anstataŭ la manĝaĵo la morto instruis la vilaĝanon kuracadi malsanulojn.

— “Kiam vi venos al malsanulo, do rigardu, kie mi sidas: ĉu apud la kapo, aŭ apud la piedoj de l' malsanulo. Se mi min trovos apud la piedoj, sekve li saniĝos; kaj se mi sidos apud la kapo, tiu homo mortos, — tian homon vi ne peni kuraci. Krom la akvo vi uzu nenian kuracilon.

La vilaĝano ekĝojis, kaj baldaŭ la famo pri lia kapableco medicina venis ĝis la reĝo mem.

Subite ekmalsaniĝis la reĝo. Ĉiuj kuracistoj estis senfortaj doni sanecon al la reĝo. Laŭ la konsilo de siaj korteganoj, li alvokis la vilaĝanon, kiu kuracadis per sola akvo pli bone ol ĉiuj doktoroj. Ĉar la morto staris apud la piedoj de l' reĝo, do la vilaĝano-kuracisto tuj sciigis la reĝon ke li saniĝos

dank'al la sola akvo. Efektive la reĝo baldaŭ saniĝis. La reĝo riĉigis la vilaĝanon...

Sed la vilaĝano nun fariĝis tre avida: li volis fariĝi pli riĉa. — "Kial mi kuracas ĉiujn per akvo sola? Ne, mi faros kuracilon propran!" diris li. Poste li prenis urtikon kaj herbojn aliajn, metis ĉion tion ĉi en akvon bolantan kaj aldonis al tiu ĉi miksaĵo ankoraŭ katon malvivan... La kuracilo nova estis preta. Kaj ree la vilaĝano komencis kuracadi ĉiajn malsanulojn. Sed nun la morto lin punis por lia kuraĝeco. Ŝi de nun fariĝis nevidebla por nia kuracisto. Ŝi diris al li: "Ĉar vi ne obeas al mi kaj ne kuracas per akvo, do vi min ne vidus de nun!"

Tiam la vilaĝano ekvidis malprosperajn. Ne sciante, kie staras la morto, ĉu apud la kapo aŭ apud la piedoj de l' malsanulo, li ne povis diri, ĉu mortos aŭ saniĝos la malsaniĝinta. Kaj post mallonge jam neniu invitadis lin por kuraci.

Fine venis la tago por lia morto. Antaŭ la morto la vilaĝano tre malsaniĝis. Li tiam ekrigardis kaj ekvidis la morton apud sia kapo... Diris li tiam al siaj filoj: "Filoj miaj, turnigu mian liton je kapo tien, kaj je piedoj ĉi tien." Ili turnigis... Mirinde!... La morto ree staras apud lia kapo. Li ree ekpetis la filojn, ke ili ree turnigu la liton. Kaj la morto ree venis al kapo lia.

Tiam la vilaĝano ekmemoris la malnovan proverbon malgrandrusan: "turnigu aŭ ne turnigu, tamen ĉiu homo devas morti" kaj fermis por ĉiam siajn okulojn.

El malgrandrusa lingvo tradukis

I. Ŝirjaev.

St. *Ŝestihino*, Rybinsko-Bologovskoj jel. dor. *Selo Vereteja* Rusujo.

ANONCOJ.

 **N. O. Lindbäck,** 
juvelisto en Luleå (Svedujo),

rekomendas sekvantajn laplandajn ornamojn:

Zono el ledo kaj drapo por viroj kun 18 grandaj arĝentaj surornamoj, prezo: de 40 ĝis 130 kronoj.

Zono el ledo kaj drapo kun 20 arĝentaj surornamoj, prezo: 20 ĝis 100 kr.

Kulero el arĝento, " 8—16 "

Pipo el arĝento, " 10—16 "

Broŝo el arĝento, " 3—20 "

Horloĝa ĉeno el arĝento por viroj, prezo: 8 kr.

Tia sama por virinoj, " 6 "

Ringo el arĝento por virinoj, " 3 "

" " oro, prezo 15—20 "

Monon oni povos sendi plejbone en franca, germana, sveda kaj angla papera mono aŭ per poŝta mandato.

Ĉiujn artikolojn mi sendas en rekomendata letero.

N. O. Lindbäck.

Adreso: Luleå (Svedujo).

Ĉe la **Klubo Esperantista en Upsala** estas aĉetebaj:

La literaturisto kaj lia fianĉino. Rakonto de Emelie Flygare-Carlén. Tradukis *Otto W. Zeidlitz*. Kostas 65 centimojn.

Du Mirrakontoj de *Otto W. Zeidlitz*. Kostas 40 centimojn.

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la *Societo "Espero" en S. Peterburgo*. Kostas 1 frankon.

Ankaŭ alian literaturon esperantan oni povas akiri ĉe la Klubo Esper. Upsala. kiel ankaŭ ĉe D-ro Zamenhof.

La kumiso-eksport'

neniam difektigas. Oni povas ĝin ricevadi dum la tuta jaro. Broŝuro (en rusa lingvo) oni ricevas senpage Adreso: St. Smyŝ-ljaevka Samaro-Zlatoust, jel. dor. Al s-ro *B. Postnikov*.